

LA PONTO

Dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperantista Asocio (L.E.A.)
Aperas en ĉiu nepara monato escepte en julio.
Jarkolekto 1, numero 1: majo-junio.
Redaktoro : Pieter Jan Doumen, Peerderbaan
81, B-3940 Hechtel-Eksel – Tel. 011-73.20.47
– Retadreso: pieter.doumen@skynet.be

Redaktore...

Dum la stariga kunveno de L.E.A., kiu okazis la 8-an de junio 2006, la prezidanto inter alie promesis starigi membrorevuon, kiun promeson ni volas nun plenumi. Efektive, ĉiuj niaj membroj rajtas ĝusta-tempe esti informitaj pri la programo de L.E.A., por ke ili ekhavu la ŝancon partopreni en ĝiaj aktivaĵoj. Aliflanke ne ĉiuj ĝiaj membroj ricevas la revuon de F.E.L., 'Horizon-taal', en kiu ni volas estontece publikigi niajn aktivaĵojn. Estas do necese por ni havi nian propran periodaĵon por anonci ilin.

Ni krome kredas, ke periodaĵo povas krei ligon inter la membroj, kiuj certe interesiĝas pri tio, kio okazas en Esperantio kaj Limburgo sur la tereno de nia lingvo.

Tial ni elektis la nomon « La Ponto », ĉar ponto trans rivero ebligas la homojn de ambaŭ bordoj renkonti sin kaj havi personan kontakton. Per tiu ĉi modesta revuo ni volas do doni al ĉiuj membroj la eblecon kontaktiĝi kaj stimuli ilin ankaŭ fari tion persone.

Tial ni bonvenigas ĉiujn artikoletojn, poemojn, anekdotojn, travivaĵojn kaj novaĵojn. Ne lasu la redaktoron sola fari la tutan laboron, kio en la daŭro tedus la legantojn. Mi esperas do, ke vi regule prenos vian skribilon por verki ion interesan. Ne timu fari erarojn. La redaktoro korektos la plej gravajn, ĉar li volas prezenti al ĉiuj membroj nur bonan lingvon. Antaŭan dankon al ĉiuj !

Kiel ĉio komenciĝis...

La 8-an de junio 2006 kunvenis en Peer 14 Limburgaj esperantistoj, plej ofte membroj de F.E.L., kiuj starigis la Limburgan Esperantistan Asocion, mallongigo : L.E.A.¹. Ĉar ne plu ekzistis en Limburgo alia oficiala klubo ol tiu de Peer, tiu ĉi prenis la inciaton kunigi la Limburgajn esperantistojn, por ke ili ne

perdu la kontakton inter si kaj kun la lingvo kaj la Esperanta mondo. Ili ĉiuj estis plenaj je entuziasmo kaj bona volo, kaj la estraro havis multajn planojn...

Ĉar la iniciato venis de la klubo de Peer, la estraro de tiu klubo fariĝis provizore ankaŭ tiu de L.E.A. Prezidanto : Henri Schutters - Sekretario : Jan Doumen – Kasisto : Rik Leijskens – Membroj : Rik Schoofs kaj An Olijslagers.

Oni interalie decidis, ke la unuan jaŭdon de ĉiu monato (ne dum la somerferioj) estos rezervita al la aktivaĵoj de L.E.A. La aliaj jaŭdoj estis dediĉotaj al elementa kurso, kiu efektive nun okazas ! Gvidanto estas Jan Doumen, eksa lingvoinstruisto.

Sed la sukceso de L.E.A. ne estis tiel granda, kiel oni povis atendi. Por la unua ĉiumonata kunveno ni havis 8 personojn, kio estis bona nombro, sed tiu ĉi rapide malpliĝis. Ni havis tri prelegojn : Eddy Vandenbossche, prezidanto de la Verda Stelo de Antverpeno, prezentis kun lumbildoj la Pasportan Servon; Ivo Durwael, tiama prezidanto de FEL, elvokis memoraĵojn pri sia spertoj kun Esperanto; Carsten Mischke rakontis pri la junulara kongreso en Serajevo. Ni rigardis plurajn esperantajn filmojn kaj festis en decembro 2007 la Zamenhoffeston. En la kunveno de la 3-a de aprilo ni skrabis sub gvido de An Olijslagers, tre aktiva membro, kvankam ŝi loĝas je 30 km de Peer. Ŝi mem 'faris' esperantan version de la fama vortludo. Estis sep entuziasmaj ludantoj.

En 2006 ses membroj de L.E.A. partoprenis en la Universala Kongreso de U.E.A. en Florenco (Italio) : Henri Schutters, Jan Doumen, Rik Leijskens, Remy Sproelants, Carsten Mischke kaj Ben Indestege. La du lastaj poste ĉeestis la junularan kongreson en Serajevo.

Ni scias, ke la situo de Peer en norda Limburgo estas malavantaĝo ; tiurilate Hasselt aŭ Genk estus pli bona. Sed estas ankaŭ grandaj avantaĝoj : senpaga disponigo de lokalo, senpaga preso de 1500 paĝoj ĉiujare ktp. ! Cetere, ĉiuj esperantistoj havas aŭton, kaj Peer estas facile atingebla. Tio ne povas esti problemo. Kaj estos nur naŭ kunvenoj ĉiujare ! Ni do esperas revidi vin ĉiujn en Peer.

¹ Antaŭe jam ekzistis la Limburga Esperanto-Ligo, kiu estis fondita por unuigi la tiamajn klubojn.

Grava novaĵo. - Ni decidis, ke la kunvenoj de L.E.A. ekde septembro okazos la lastan jaŭdon de ĉiu monato (escepte en decembro, kiam okazas la Zamenhoffesto). La kaŭzo estas, ke *Horizon-taal* ofte ne alvenas antaŭ la unua jaŭdo de la monato.

La 97-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Roterdamo de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008.

Neesperantistoj ofte riproĉas al ni, ke Esperanto estas lingvo, kiun oni parolas en nenia lando. Tio ne estas vera. Dum ĉiuj kongresoj kaj kunvenoj – precipe dum la ĉiujara Universala Kongreso de U.E.A. – oni parolas nur Esperanton. Kongresoj kaj kunvenoj estas do, se tiel diri, la ‘lando’, kie oni parolas Esperanton, kaj krom tio bonegaj okazoj praktiki la lingvon. Jam du membroj de nia Asocio, laŭ nia scio, aliĝis, nome Rik Leijskens kaj Jan Doumen. Kaj vi ?

Membroj de L.E.A.

A. Membroj de F.E.L.: *Bovendeerd Jan, Lanklaar - Claessen Albert, Diepenbeek - Coerman Guido, Hasselt - De Munck Hugo, Zonhoven - Despriet Jan, Peer - Doumen Jan, Hechtel - Hotterbeekx Paul, Achel - Leijskens Rik, Gruitrode-Noelanders Johan, Brustem - Olijslagers An, Veghel (Nl.) - Schoofs Harry, Peer - Schutters Henri, Peer - Umans Herman, Wellen - Vandebergh Jos, Helchteren - Vanderfeesten Emiel, Oplabbeek - Willems Eddy, Achel.*

B. Nemembroj de F.E.L.: *Schouten Hendrik, Neerpelt - Sproelants Remy, Paal.*

C. Junuloj: *Ben en Chris Indestege, Lanklaar - Miesen Ivo, Maastricht - Carsten Mischke, Balen.*

N.B. La membroj de F.E.L. estas aŭtomate membroj de L.E.A. Ekde sia 25-a jaro la esperantistoj, kiuj ne estas membroj de F.E.L., povas membriĝi per ĝiro de 12,50 eŭroj al la bankkonto n-ro 735-0190144-12 de L.E.A. antaŭ la 1-a de januaro de la koncerna jaro. La junuloj, membroj de TEJO aŭ ne, pagas nenion ĝis sia 25-jariĝo.

Programo por majo kaj junio

Ĉar ni konstatis, ke *Horizon-taal* ne ĉiam aperas antaŭ la unua jaŭdo de la monato, ni decidis ne plu kunveni la unuan jaŭdon de la monato ekde septembro. Atentu ankaŭ pri la datoj de la kunvenoj de L.E.A. en majo kaj junio de tiu ĉi jaro:

La 15-an de majo : Prelegos Jan Doumen pri « Kie iam kuŝis Trojo ».

La 12-an de junio : Agrabla kunesto en kafejo « Esperanto », Pauwengraaf, Eisden (Dilsen) kun kartludo kaj kanto.

Ekde septembro ni kunvenos la lastan jaŭdon de ĉiu monato, escepte en decembro pro la festo de Kristnasko.

Estontece ni publikigos la programon de L.E.A. en *Horizon-taal* kaj en *la Ponto*, por ke ĉiuj membroj de L.E.A. povu esti informitaj pri niaj aktivaĵoj.

La rekta metodo

Antaŭe oni instruis ĉiujn lingvojn – ĉu klasikajn, ĉu modernajn – tute kiel matematikon. Oni deiris de la partoj (vortoj kaj reguloj) al la tuto (frazo). Cetere oni ĉiam ekiris de la gepatra lingvo. Kolizioj inter la gepatra kaj la fremda lingvo estis do ofteĝaj.

Sed psihologiaj kaj neŭrologiaj studoj pruvis, ke tiu metodo tute kontraŭas la homan naturon. Infaneto, kiu lernas sian gepatran lingvon, vidas kaj aŭdas nur tutajojn, t.e. tutajn bildojn, kiujn ĝi stokas en sia memoro.

La rekta metodo, kiun oni evoluigis komence de la 1960-aj jaroj, tute akordas kun tio, kion faras infanon. La lernantoj lernas la lingvon per tutaj frazoj en la sekvo : aŭdi, paroli, legi, skribi. Kaj oni faras tion rekte en la cellingvo (Esperanto) sen uzo de la gepatra lingvo. Tial la instruisto ĉiam parolas la cellingvon kaj klarigas la novajn vortojn per fotoj, desegnaĵoj, kaj gestoj aŭ elektas la frazojn tia-maniere, ke la signifo de la vortoj fariĝas klara per la kunteksto. Li nur tre malofte tradukas en la gepatran lingvon. Tiel la lernantoj lernas kompreni kaj paroli la cellingvon ekde la komenco. Poste legi kaj skribi estas infanludo.

Laŭ tiu metodo Esperanto estas instruata en Peer.